



Pos-Amiko

Vintro 2021, numero 39

Pensu pri aliaj homoj, restu hejme kaj havigu la gazeton!

INDEKSO:

1. Ankoraŭ unu jaro da Pos-Amiko!
2. Pli grandaj premioj en belartaj konkursoj
2. Granda censo de esperantistoj
3. Kara Koko
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

Ankoraŭ unu jaro da Pos-Amiko!

Antaŭ dek jaroj komenciĝis granda aventuro, kun mi, NEJ-anoj, KKPS-partoprenantoj, vi fidelaj legantoj, kaj kompreneble mi. Neniu krom mi tiam povis scii, kiom granda sukceso iĝos la Pos-Amiko, kaj kiom ĝi ŝanĝos la movadon kaj ĉies vivojn en pozitiva maniero. Tamen nenio povas daŭri senfine, kaj la plej bonaj serioj bezonas iam finon.

Notu jam en via kalendaro: la granda finalo de la Pos-Amiko, la numero 42, aperos inter la 28-a kaj la 30-a de oktobro 2022 en Delft, en KKPS, tie kie ĉio komenciĝis. Ĉiuj misteroj estos solvitaj: kie D-ro B. Telo trovos laboron, kiel fartas Lazaro Zombenhof, kaj kio okazis al Foko Poso?

ANONCO

Volontuloj bezonataj por scienca eksperimento pri ligo inter kunsidoj kaj enuiĝo. Respondu al d-ro K. Mitato.



Pos-Amiko

Somero 2012, Numero 1

INDEKSO:

- Trovitaj dokumentoj konfirmas: Lukiz volas iĝi diktatoro..... 1
- Scienco pravas ligan inter vodio kaj ebrico..... 2
- Peпо kaj Poso kaptitaj en korupta skandalo..... 2
- La horoskopo..... 2
- Marek Blahuš evidentiĝas roboto..... 3
- Probal Dasgupta kabesas: "Mi konfuzia Esperanton kun hispana"..... 3
- EVENTOJ..... 4

Trovitaj dokumentoj konfirmas: Lukiz volas iĝi diktatoro.

En ŝoka revelacio pasintsemajne en la Verdejo, la somera palaco de Varsovia Vento-gurulo Irek B., estis trovitaj notoj kaj taglibro, kiuj malkovras longdaŭrajn planojn de TEJO-perfidanto Lukasz Zubrowski kaj konspirantoj por kapti absolutan povon en TEJO. La sekvaĵaj faktoj povas ŝoki la legantojn (sed pli verŝajne amuzos ilin).

La konspiro komenciĝis en 2010, kiam Gregor Hinker, la tiamia perfidanto de TEJO, ne povis veni al estrarkunsido pro erupcio de Eyjafjallajökull. Nun montiĝas, ke Zubrowski erupciigis Eyjafjallajökull por forpeli Gregor el la kunsido kaj tiel subfosi lian pozicion. Ŝajne sukcese, ĉar en 2011 Lukiz fariĝis la 27-a perfidanto de TEJO.

Indas rimarki, ke por ĉiu posteno estis ekzakte unu elektable kandidato. En 2011 kaj 2012 Zubrowski forigis la restantajn kontraŭulojn el la oficoj de TEJO: la volontulon en decembro, la redaktoron de TEJO Tilmunde en januaro, la kasiiston en aprilo kaj la ĝeneralan sekretariojn en majo, lian lokon prenis proksimume de Zubrowski: Natalia, Pavel kaj Szabolcs; ĉiuj el Varsovio, kaj Przemyslaw el Bjalistoko, Polujo. La nun trovitaj dokumentoj montras planojn por forigi la ankoraŭ restantan reziston: la planoj estis inkluzivas "kabelejojn" de gravuloj.

Jus antaŭ presado de tiu El Pos-Amiko senromulino el Canale, Italujo komentis, ke ŝi vidis novan kasiiston Nico Huurman movi gravajn dokumentojn al fortikaĵo norde de Roterdamo. Nico rifuzis komenti.

Kiom juna mi estis en 2012!

Pli grandaj premioj en belartaj konkursoj 2022

Ankoraŭ sep monatoj ĝis la Universala Kongreso, sed jam venis grava anonco: ĉi-jare la premioj por la gajnintoj estos multe pli grandaj, kaj iom malkutimaj. Kutime tri premioj gajneblas en ĉiu kategorio, sed ĉi-jare la dek plej bonaj en ĉiu kategorio ricevos plenan skatolon el la biblioteko Hector Hodler. Ne necesas aliĝi: oficistoj de UEA aktive serĉos en la reto pri kreaĵoj premiindaj, por havi laŭeble multajn kandidatojn.

Onidire la jutubisto Evildea tuj ĉesis alŝuti novajn filmetojn por ne riski gajni premion en la kategorio 'Teatraĵo, subbranĉo monologo kaj skeĉo'.

Granda censo de esperantistoj

La Statistika Fakto de la Unuiĝintaj Nacioj finfine planas ataki la plej gravan statistikan demandon en la mondo: kiom da homoj parolas Esperanton? Tiu ĉi demando jam longe hantast la movadon, kaj diversaj aliroj aperis por trovi respondon: kolekti adresojn, kalkuli membrojn, aŭ statistike analizi ekzistantajn censojn. La aktuala esploro, subtenata de la famo kaj statuso de la Unuiĝintaj Nacioj, havos pli praktikan metodon: ĉiuj esperantistoj kolektiĝu en unu loko por esti nombritaj.



Multe da spaco tie.

La elektita loko estas en Westelbeers, Nederlando, inter la 20-a kaj 27-a de aŭgusto. Laŭ pritakso de la UN-oficejo "ĉiu ajn, kiu nomas sin esperantisto, ne volus esti en alia loko tiam". Aldona avantaĝo de Westelbeers estas, ke ĉirkaŭ la kongresejo, kiu mem povas gastigi 300 homojn, troviĝas malplena kamparo kaj erikejo, kie pliaj miloj da homoj povas laŭbezzone tendumi.

La kuniĝo de ĉiuj esperantistoj ofertas ŝancojn ekscii diversajn substatistikojn: kiom el ili manĝas viandon, kiom el ili povas parkere kanti la himnon, kaj kiom da homoj enhavas averaĝan esperantistan amrilaton?

Kara koko...

“Kiel mi konvinku miajn amikojn veni al la IJK? Prefere laŭleĝe.”

Kara homo,

Veni al la IJK estas grava rito en la vivo, kaj ĉiu pagipova esperantisto devas almenaŭ unufoje fari la pilgrimadon.

Se tio en si mem ne sufiĉe konvinkas homojn, konsideru kombini la vojaĝon al IJK kun vizito al aliaj interesaj lokoj, ekzemple Amsterdamo kun siaj konataj kafodomoj. Aŭ diru, ke vi planas iri al feriejo kun plaĝo, kie hazarde ankaŭ okazos kongreso.

Jen multaj eblecoj, do verŝajne vi ne bezonos ĉantaĝi aŭ homkapti ies infanojn.

Poso

Skribu viajn demandojn al
kkps.klackunveno@gmail.com

NEJ-

Novajoj!

Loko por KKPS elektita

La Klaĉ-Kunveno Post-Somera en 2022 okazos en la konata gastejo Kruithuis en Delft, Nederlando denove. Aliĝilo baldaŭ aperos!

KKPS-teamanoj serĉataj

Por ke efektive aperu aliĝilo kaj okazu KKPS, necesas iuj, kiuj verkas retpaĝon, varbas ĉie, kaj planas la manĝojn kaj la programon. Ĉu vi?

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Ne faru kiel ĉiuj individuemuloj, estu la alternativulo, kiu sekvas la amason.

Taŭro: Vi ricevos subite donacon, kiun vi ne atendis. Akceptu ĝin por via najbaro.

Ĝemeloj: Vi renkontos vian bonkoran ĝemelon dum manĝopaŭzo.

Kankro: Travivu la vintron per relegado de ĉiuj Pos-Amikoj.

Leono: Ne risku maltrafi vian buson, dormu kun ŝuoj kaj jako.

Virgulino: Post longaj vintraj noktoj vi ne plu estos.

Pesilo: Ĉu vi jam konsideris krei propran kronvirus-variaĵon?

Skorpio: Ne forgesu regule brosi la bitokojn en via komputila memoro.

Alekĉjo: Por pli da profito ĉiu karavano tranoktu en via gastejo.

Sagitario: Vi malkovros, ke pli interesas IJK ol Rokoko.

Kaprikorno: Ĉu vi volas pli da feriaj tagoj? Insultu vian ĉefon morgaŭ!

Akvisto: Vi ne kredas je interreto kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Fiŝoj: Por tiu ĉi monato vi ne meritas horoskopon.

Nur kelkaj tagoj por aliĝi!

Almenaŭ se vi, samkiel tipa nederlandano, ŝatas ŝpari monon. Aliĝu ĝis la **9-a de januaro** al la IJK 2022, kaj vi pagas la **plej malaltajn kotizojn**. Poste ili estos nur pli altaj!

Tiu ĉi kongreso vere havos ĉion: ludoj, sporto, ekskursoj, longaj kunsidoj, mallongaj kvizoj, noktoj en trinkejo aŭ gufujo, la plej bonaj junularaj artistoj, kaj propra plaĝo. Kaj ĉio en spaco nur por la kongresanoj, kaj sen interrompoj pro malforta retkonekto. Vi povos eĉ tuŝi aliajn homojn!



IJK 2022 NEDERLANDO

De Roerdomp - Westelbeers

La kongresejo mem estas en la mezo de naturo, sed la regiono estas tre bone atingebla per aviadilo, aŭto, trajno aŭ buso. La organiza teamo ofertas karavanojn el kaj al ĉiuj direktoj.

Programo	11-18j	19-26j	27-35j	35j+
A-landoj	30 €	50 €	80 €	110 €
B-landoj	15 €	35 €	65 €	95 €
C-landoj	0 €	20 €	50 €	80 €

En tendo/tipio	20 €
Amasĉambro	35 €
Lukseta ĉambro	50 €
2-persona ĉambro	100 €

Matenmanĝo	2 €
Tagmanĝo	6,5 €
Vespermanĝo	3 €
Tuta semajno	74 €

Partopreno eblas ekde nul eŭroj, kaj en la praktiko vi povas elspezi dum la IJK nur **150 €**, karavano inkluzive. Elektu mem vian nivelon de lukseco, vian tipon de manĝo, kun kiaj kaj kiuj homoj vi volas dormi, kaj al kiuj programeroj vi iros. Vi povas legi ĉion en la retpaĝo:

ijk2022.tejo.org